

LA VERDA LUPEO



INFORMILO de ELF/AREK

Aŭgusto 2020

(52a jaro)

N-ro 184

Esperanto-Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcia skipo: Bert BOON - Merelhof 8 - BE-3300 Tienen

Elda DOERFLER - Via del Ghirlandaio 18/1 - IT-34138 Trieste

James REZENDE PITON - Rua Aristides Perini 48 - BR-13141-025 Paulínia-SP



2022: Montrealo atendas vin!



Karaj Liganoj kaj Geamikoj!

Mi esperas, ke ĉiuj vi, kune kun viaj familianoj kaj amikaro, superis tutsane kaj senprobleme la timigan pandemian periodon. Feliĉe ĉio en ordo ĉe mi: mi profitas por danki ĉiujn kiuj sendis al mi subtenajn kaj kuraĝigajn retmesaĝojn. Ĉio ĉi vere min kortuŝis! Rean dankon!

Kiam finfine mi sukcesis forsendi la LVL-n n-ro 183, ŝoke kaj atentigite mi rimarkis gravan eraron surkovrilan: anstataŭ “Aprilo 2020”, estis skribite “Aprilo 2019”. Bonvolu korekti kaj... pardoni min.

Malgraŭ la deviga fomiteco, kiun ĉiu el ni eltenis pli aŭ malpli pacience, la laboroj favoraj al nia Ligo daŭris. ELF-AREK eĉ partoprenis en UK, en la Virtuala Kongreso: ĝi ĉeestis la Movadan Foiro de fojojn, en la sabataj tagoj, komenca kaj fina, dum kiuj ni bunte informadis pri agado kaj E-filatelito. Ne estis facile por mi, kiu malkapablas umadi la komput-teknikon, sed danke al la spertega kunredakciano-komputilisto James REZENDE PITON, la tuto disvolviĝis kontentige.

Krom flegadi nia retejon, iĝantan pli kaj pli riĉa (kiun - espereble - vi ĉiuj jam esploris), li sukcesis per la valorega kunlaborado kaj longtempa helpado de mirindaj personoj, arkivi ĉiujn revuojn ekde 1968 ĝis antaŭ 5 jaroj (tie legeblas eĉ du “La Verda Lupeo”-j el la jaro 1963a, tiam zorgitaj de la karmemora prezidinto Herman HEISS) .

Sekve de la volontula sindediĉo de Javier GUERRERO kaj Carlos ILLA (Biblioteko Ramon Molera Pedrals - <http://bibliotekomolera.org>) kaj Ivan GARCÍA (<http://bitarkivo.org>), estis skanitaj dekoj kaj dekoj da revuoj, kiuj nun estas alireblaj al la publiko ĉe:

<http://bitarkivo.org/gazetoj/verdalupeofenikso>

Tie legeblas granda parto de la historio de E-Filatelistaj Asocioj: sen tiu arkivo disperiĝus ĉiaj informoj pri la aktivado, dum pli ol duon-jarcento, de tiuj fak-esperantistoj.

Por fini, mi rememoras al forgesintoj renovigi por la 2020a j. la membro-kotizon, kaj la samon mi petas de iuj kiuj ŝuldas ankoraŭ tiun por la 2019a j. Kiel sciatas, la kaso de Elf-Arek pleniĝas NUR per la pagitaj kotizoj, sen kiuj agado tute ne eblas. Kosto por presado kaj ekspedo pli kaj pli altiĝas, tion ĉi nepre prikonsideru. Sed la fakto ke iuj ne pagis jam de du jaroj, pensigas min, ke ili ne plu interesiĝas pri nia Ligo: tial mi varme ilin petas, informi min pri sia eksigo, tio estas plej honesta ago, por eviti, ke mi elspezu malŝpare la monon de kiuj ĉiam akurate kontribuis kaj kontribuas al pluvivado de nia societo.

Estime, Elda Doerfler

AMIKOJ, VI FORLASIS NIN,
SED ETERNE VI VIVOS EN NIAJ KORJOJ!

Kun ankora doloro kaj profunda malĝojego mi anoncas al vi la forpason de tri niaj kolegoj, dum multe da jaroj fidelaj esperantistoj kaj entuziasmaj filatelistoj.

En majo, alvenis la informo pri la morto de s-ro SUZUOKI Zirô el Kobe, komence de tiu ĉi jaro. Li iĝis membro de la Ligo en 1986. Li estis aktiva en sia loka grupo kaj en nia Ligo. Multe li helpis, ĝislaste, por la kompletigo de la katalogo pri E-stampoj. Mi havis la honoron ekkoni lin dum la UK-o en Jokohamo (2007) - ĝis la fino de la pasinta jaro ni estis ankoraŭ en kontakto. En la lastaj ĉ. 4 jaroj li loĝis en hejmo por maljunularo, kien bedaŭrinde li ne rajtis kunporti sian komputilon, danke al kiu interŝanĝeblis pli ofte mesaĝoj. Mi dolĉe rememoras la delikatajn paperfoliojn de li senditajn kun surprisitaj mandesegnitaj floroj el mildaj koloroj kaj lian elegantan skribmanieron.

En aprilo, mesaĝis al mi Ligano Roberson Mauricio Caldeira Nunes, informante pri la forpaso de sia kaj mia kara amiko Gert DRUCKER el Curitiba, Brazilo, frumatene de la 11a de tiu monato. Ankaŭ kun li, feliĉe, mi persone konatiĝis: tio estis okaze de kunveno de ELF-AREK dum la Fortaleza UK (2002). Dum la jaroj ni ĉiam restis en kontakto, interŝanĝante ofte filatelaĵojn. Mallonge pri lia vivo: Gert DRUCKER naskiĝis en Berlinchen, (en tiutempa Germanio, nun Balinek, Pollando) en 1930. Judo, li sukcesis eskapi el la naziisma furiozo, rifuĝis en Francio, de kie kun la patrino alvojaĝis Brazilen. En tiu nova patrujo li laboris kiel komercisto kaj poŝtovicisto, ĝis sia diplomiĝo kiel psikologo. Li estis membro de ELF pli-malpli de la jaro 1980. Mi varme konsilas vin legi plue pri Gert Drucker en la jenaj tt-ejoj: vere indas!

<https://medium.com/@carolinestedile/holocausto-de-cada-dia-84e5fda715d3> ;

<https://www.museudoholocausto.org.br/galeria/gert-drucker/> ELDO

La 29an de julio subite forpasis samideano s-ro MAEKAWA Haruja (1930.1.20-2020.7.29). Pri li parolas lia amiko SOMEKAWA Takatosi.

Por pliricigi la kolekton mi eklernis Esperanton - li ĉiam tion ĉi rakontis. De kiam li estis elementa lerneano, li kolektis poŝtmarkojn. Post la Dua mondmilito lia kolego iutage rekomendis al li, ke li lernu Esperanton por interŝanĝi poŝtmarkojn kun diverslandaj samideanoj. Li tuj diligente eklernis nian lingvon. Mi aŭdis de li, ke la

unua korespondamiko estis aŭstra elektristo. Krome li plurfoje menciis karan mian filatelistan avon en Francio, Georges Saget. Li ŝajne multe ŝuldis al la kara avo. Antaŭ kelkaj jaroj li eltrovis la nomon de la avo kaj kortuŝita montris la artikolon.

Li pliriĉigis sian kolekton uzante Esperanton. Samtempe li mem decidiĝis eldoni diversajn poŝtkartojn, poŝtmarkojn, poŝtstampojn. La *Orienta Societo de Esperanta Filatelo* estis fondita de li.

Okaze de la 39a Japana Esperanto-Kongreso en Kioto (1952) li klopodis por emisio de memora poŝtstampo¹. De post tiam li ofte eldonis specialan kongresan stampon, troviĝas jam pli ol 50 memor-stampoj de kongresoj landaj, lokaj kaj du-fojaj universalaj (Tokio en 1965 kaj Jokohamo en 2007), sen paroli pri la multegaj pk-oj.

Sendube li estis motoro de E-filatela movado en Japanio. Li dum multaj jaroj senlace aktivadis kun pasio kaj sindonemo. Estis honoro por mi kelkfoje kunlabori kun li. Mi tre bedaŭras lian forpason. Pacon al lia cindro!



1.



NIPPON 62




NIPPON 52



奈良中央



左京



En la aprila LVL 183a, je la paĝo 5a estis montrita la flanko glm-o, sur kiu estis skribitaj propagandvortoj en pluraj lingvoj. Tamen je la fino: “La lasta frazo kredeble estas en la rusa, dum la supran mi ne rekonas”. S-ro SOMEKAWA Takatosi el Japanio tre afable informis, ke la frazo コクサイホジョゴ エスペラント ヲ マナベ havas la jenan signifon: “Lernu la internacian helplingvon Esperanto”, japane kompreneble.

Koran dankon al li pro la klarigo!

SIMPLA POŝTKARTO RIVELAS KE...

... FAMA MONTREALANO ESTIS ESPERANTISTO!

James REZENDE PITON

Ju pli pasas la tempo, des pli facile perdiĝas spuroj pri forpasintoj.

Tiuj, kiuj rekte kontaktis kun ili maljuniĝas kaj post jardekoj jam ne plu restas vivanto kun persona memoro pri ili. Bonŝance ie-dise plu kuŝas dokumentoj, kiuj atestas faktojn kaj helpas al ni kompreni forgesitan detalon pri ilia vivo. Kaj inter tiuj dokumentoj estas niaj ŝatataj kaj kolektindaj Esperantaĵoj. Ilin konservi helpas do nunaj kaj estontaj historiistoj. Ankaŭ tial gravas la agado de nia Ligo, kiu kunligas la informojn, kiujn ni ĉiuj kompilas.

Ekzemplo pri tio estas la prezentata poŝtkarto, kiun mi antaŭnelonge malkovris. Ĝi havas la novjarajn salutojn (por 1909) en Esperanto de

Ludger Larose (1868-1915), pentristo, kiu naskiĝis kaj mortis en Montrealo, Kanado. Liaj verkoj partoprenis en tre multaj artekspozicioj. Lia artkapablo estis laŭdata ne nur pro la beleco de la verkoj aŭ pro tio, ke li, poste kontraŭklerik-



isto, estis komisiita pentri en la montreala katedralo. Pluraj estas ankaŭ portretaj pentraĵoj, kiujn li laŭmende produktis. Larose ankaŭ instruis desegnarion, private kaj en lernejoj, kaj eĉ preparis porinstruistajn kursojn kun tute nova metodo pri instruado de tiu metio.

Oni scias, ke li havis multajn interesojn: li entreprenis kiel monpruntisto kaj negocis pri nmoveblaĵoj. Sed lia intelektula vivo ne estis malpli riĉa kaj li ofte prelegis. Li estis aktiva framasono kaj partoprenis societojn pri naturhistorio, pri numismatiko kaj anktivaĵoj kaj... en E-Klubo Progreso! Oni raportas, ke li havis intensan korespondadon en Esperanto kaj certe tiu ĉi karto tion pravas, ĉar li eĉ zorgis havi personan novjaran poŝtkarton kun sia portreto. Eble nuntempaj kanadaj esperantistoj ne kalkulas pri tiu esperantisteco.

Larose forpasis tre juna, nur 47-jara. Li tamen estis tre produktema pentristo - estas konataj 400 pentraĵoj kreitaj de lia peniko tra 30 jaroj de kariero!

ĈIO IROS BONE!

*Yevgeniya (Ĵenja) AMIS
sekretario de la Montreala LKK*

Jen du belaj aldonadoj al via kolekto: la ĉielarkaj poŝtkarto kaj poŝtmarko de espero el Kanado, el la jaro 2020: la jaro, kiam ni bezonas esperon, eble, eĉ pli ol iam ajn antaŭe!

Meze de aprilo mi verkis artikolon por la revuo *Esperanto* pri tio, kion traspertis la Montreala UK komence de la pandemio, kaj la decido prokrasti ĝin. Tiam mi skribis, ke nia kongreso eniris en la historion, sed ne kiel ni pensis... Malfeliĉe, la evento, kiun ni planis de tiom longe, en kiun ni investis tiom da amo, tempo kaj dediĉo – la UK-2020 – eniris en la tre longan liston de neokazintaj kongresoj...

La solaj du okazoj, kiam jam planitaj kongresoj ne okazis, estis ambaŭfoje pro militoj. La unua planita, kaj neokazinta kongreso, estis la UK-1914 en Parizo, kiu estis nuligita pro la eksplodo de la Unua mondmilito kaj la dua en 1967, Tel-Avivo, pro la Sestaga milito (dum la militoj kongresoj ne estis planitaj, kaj ne okazis, kompreneble). La pariza UK estis inaŭgurita kaj tuj fermita, kaj la Israela kongreso estis movita al Roterdamo, nur semajnojn antaŭ la UK – alivorte, ĝi ja okazis, sed en tute alia formo, alia lando kaj malsama teamo. Tel-Avivo havis sian UKon 33 jarojn post tiu prokrastita de 1967, nome en 2000. Parizo gastigis la UKon en 1932: do, 18 jarojn post 1914.

Nia situacio en Montrealo estis iom malsama – ni sciis jam ekde aprilo ke la ĉeesta UK-2020 ne povos okazi, pro la pandemio (la unuan fojon en la historio, ne pro milita kaŭzo). Krome, la Montreala LKK estis ankaŭ tiu, kiu proponis al UEA prokrasti ĝin ĝis du jaroj – kaj la UEA-estraro akceptis tion. Al la montreala UK aliĝis iom pli ol 820 personoj kelkajn semajnojn antaŭ la fino de la dua aliĝperiodo – oni povus supozi, ke temus pri kongreso de ĝis 1500-1800 partoprenantoj aŭ eĉ iom pli.

Mi rakontu kiel venis al ni la ideo pri la poŝtkarto kaj poŝtmarko. Ĉi-printempe, kiam Esperanto-Societo Kebekia transiris al virtualaj kunvenoj, kara amiko nia, Randy DEAN el Atlanto, venis al unu el tiuj kaj demandis, ĉu ni planas eldoni poŝtkarton por la UK-2020 – t.e. la

prokrastita UK. Kompreneble, por la ĉeesta UK ni planis fari tutan aron da objektoj. Interalie, ni intencis eldoni poŝtkarton, poŝtmarkon kaj eĉ aranĝi specialan stampon – sed ĉu eldoni ion por la ne-okazonta UK? Antaŭ tiu ĉi demando ni eĉ ne pensis pri tia oportuno – sed tiu ideo eldoni specialan poŝtkarton ĝuste por 2020, kiam la fizika UK ne okazos, “kaptis” min – mi pensis ke vere indas fari ion tian: por historia memoro, por ĉiuj kolektantoj, por tiuj, kiuj planis veni al Montrealo, kaj por ni, la LKK mem.

Kiam mi klarigis ĉion ĉi al la LKK, la reago estis miksita – kelkaj opiniis, ke eldono de poŝtkarto por 2020 malfermos la vundon, kaj pli bone ne fari. Mi pensis male: la poŝtkarto povas esti pozitiva, esperodona kaj rigardanta al 2022. Mi ankaŭ petis al Elda Doerfler, la prezidanto de Esperanto-Ligo Filatelista (ELF), konsilon – kaj ŝi senhezite subtenis. (Mi poste lernis de la prezentaĵo de James Rezende Piton dum la Virtuala Movada Foiro, la du aliaj neokazintaj UK-oj ankaŭ havis poŝtkarton kaj glumarkon – kaj tiuj estas raraĵoj nun.) Ĉar en la Montreala LKK ni estas tre permesemaj, kaj se iu teamano volas fari ion kaj pretas mem labori pri tio – oni ricevas la verdan lumon – do, mi komencis dezajni!

Sur la poŝtkarto vi vidas la ĉielan linion de Montrealo kaj ĉielarkon – la ĉielarko, kompreneble, fariĝis la universala simbolo de kuraĝo kaj espero en la tempo de koronaviruso – en Montrealo kaj tutmonde. Sur la karto estas skribite: “2022: Montrealo atendas vin” – ja ni ĉiuj esperas, ke ĉiuj, kiuj planis viziti la urbon en 2020, tion ĉi faros – kaj ankaŭ tiuj, kiuj ne planis veni en 2020, tamen eble venos en 2022. Sur la dorsa flanko estas la fama citaĵo de Zamenhof: “Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante, ni iru la vojon celitan!” – estas citaĵo, kiu donis la kuraĝon kaj esperon al ni, la LKK, kaj ni esperis, ke ĝi ankaŭ donos kuraĝon al ĉiuj esperantistoj, kiuj vidos la karton. La emblemo de la montreala UK aperas ĉirkaŭita de ronda ĉielarko, kaj la adreslinioj ankaŭ formas ĉielarkon. La emblemon dezajnis la konata esperantisto Francisco Luis Veuthey (Franĉjo), profesia grafikisto kaj dezajnistoj, loĝanta en Nederlando. Franĉjo dezajnis la plejparton de la emblemoj de la UKoj en la lastaj jardekoj. Notu ke ĉiuj proporcioj de la konstruaĵoj sur la emblemo kaj la monto respektas ilian realan grandon kaj proporciojn unu al la alia. Ni aparte fieras kaj ŝatas nian montrealan emblemon kaj dankas al Franĉjo.

La poŝtkarto estas ĉ. 15 cm x 10 cm (6 x 4 koloroj laŭ nord-amerikaj mezuroj). Ĝi estas el kartonpapero (14 punktoj, de tipo C2S), kaj ĝia

fronto estas lakita, kun koloroj ambaŭflanke. La poŝtkartoj estis printitaj en Kanado (ni produktis mil ekzemplerojn).

Kiam la dezajno estis preta kaj mi montris ĝin al la LKK, jam ne plu estis miksitaj sentoj – ĉiuj unuanime ŝategis ĝin, kaj ĝojis ke mia obstino tamen gvidis al tiu ĉi bela produktaĵo. Tiam ni ankaŭ decidis eldoni la poŝtmarkon de Espero, por kompletigi la poŝtkarton. Mi pensis, ke la ĉielarko kun la vortoj “Ĉio iros bone”, plus la urbo kaj la jaro (Montrealo - 2020) estus taŭgaj por la poŝtkarto. Tio, fakte, estis la vortoj kaj la bildo, kiun ni afiŝis en *Facebook*, kun la klarigo pri la prokrasto de la UK, kaj - mi kredas - ili kaptis la korojn de esperantistoj. Estas, efektive, la unua kanada poŝtmarko en Esperanto (la Vankuvera UK havis glumarkon, sed ne la poŝtan markon). Mi mem desegnis la ĉielarkon kaj skribis la vortojn – la desegnaĵon, cetere, mi donacis por la aŭkcio de la Virtuala Kongreso, por profitigi UEA-n (aĉetitan kontraŭ 65 eŭroj fare de komitatano B por Kanado, s-ro Guy Matte).

Mi uzis la servon “Picture Postage/Timbres-photos” de la Kanada Poŝtservo por produkti la poŝtkarton (<https://www.picturepostage.ca/>), kiu permesas mendi speciale faritan poŝtmarkon. Ni mendis 250 poŝtmarkojn (5 foliojn de 50 poŝtmarkoj sur ĉiu folio de 21,5 x 28 cm). La grandeco de unu poŝtmarko estas 4 x 2,5 cm – (la grandeco de ordinara poŝtmarko en Kanado estas ĉ. 2.5 x 2 cm – do, la speciale menditaj poŝtmarkoj estas pli grandaj ol la ordinaraĵ).

En Kanado ekzistas tri specoj da poŝtmarkoj: enlandaj (t.e., kiuj validas ene de Kanado), Usonaj (t.e., ili iras al ĉiuj partoj de Usono) kaj internaciaj (al ĉiuj aliaj landoj). Enlandaj poŝtmarkoj estas “eternaj”: t.e., ili ne havas la prezon sur ili, kaj ĉiu enlanda poŝtmarko en Kanado validas por ĉiam. Je la momento de la skribado, la kosto de unuopa poŝtmarko por Kanado estas 1.07 kanadaj dolaroj (0.92 dolaroj se vi aĉetas dekon da poŝtmarkoj, en rulaĵo aŭ kajero). Estas la sama prezo por letero aŭ poŝtkarto. La indiko, ke temas pri enlanda poŝtmarko, estas acerfolio kun litero “P” en ĝi.

La usonaj markoj kostas iom pli: 1.30 kanadajn dolarojn. La internaciaj poŝtmarkoj kostas 2.71 kanadajn dolarojn. En la kazo de usonaj kaj internaciaj poŝtmarkoj, la prezo povas altiĝi – kaj se ĝi altiĝas, oni devas aldoni aliajn markojn por trafi la nunan prezon. Notu, ke oni povas ankaŭ simple uzi plurajn kanadajn poŝtmarkojn kaj por Usono kaj internacie: en la kazo de Usono, oni povas simple alĝui du

kanadajn enlandajn markojn (eĉ se oni perdas iom da mono, farante tion), aŭ simple uzi tri kanadajn markojn se oni sendas internacie. Do, pro tio ni mendis nur kanadajn markojn, ĉar ĝi ja bone kombiniĝas kun aliaj specialaj poŝtmarkoj, aŭ kun la ordinaraĵ kanadaj poŝtmarkoj. Ekzemple, se mi devas sendi el Kanado la poŝtkarton al Italio, mi algluos la specialan “ĉielarkan” poŝtmarkon, plus du ordinaraĵ kanadajn poŝtmarkojn. Kompreneble, la kosto de la speciale menditaj poŝtmarkoj estis pli alta ol tiu de la ordinaraĵ markoj.

Ni jam uzis plurajn poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn por la kampanjo “Poŝtmarko de Espero”, invito donaci al la montreala UK kaj ricevi kiel donaceton poŝtkarton subskribitan de unu el LKK-anoj (se oni donacas 22 eŭrojn) aŭ de la tuta LKK (se oni donacas 100 eŭrojn). Je la momento de tiu ĉi skribado (mezo de aŭgusto 2020), ni jam atingis pli ol 70%-on de nia celo: 2022 eŭroj por la jaro 2022 – ĉiu kolektita mono uziĝos por la UK-2022. Legu pri la kampanjo ĉi tie: [Montrealo-2022: poŝtkarto de espero! – 105-a Universala Kongreso de Esperanto](#)
Ni invitas vin ankaŭ partopreni en tiu ĉi bela kampanjo kaj montri al la montreala UK vian subtenon.

Ni planas vendi la poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn dum la UK en Belfasto en 2021 kaj en Montrealo en 2022 per la libroservo de UEA. Antaŭ tiam, vi povas aĉeti ilin rekte de ni, la Montreala LKK (vi povas sendi monon al g.evans@esperanto2020.ca aŭ viziti la paĝon <https://esperanto2020.ca/eo/posxtkarto> por fari kreditkartan pagon -- plej sube). Vidu sube la prezojn (al kiuj aldoniĝos la sendokostoj). Se vi ŝatus akiri aliajn kvantojn, aŭ se vi volas ke la poŝtmarkoj NE estu algluitaj jam, kontaktu la montrealan LKK-on (lk@esperanto2020.ca)

PREZOJ:

Unuopaj ekzempleroj:

- ★ 1 poŝtkarto: 1 eŭro
- ★ 1 poŝtmarko: 2 eŭroj
- ★ 1 poŝtkarto + 1 poŝtmarko: 3 eŭroj


Pakaĵoj:

- ★ 15 poŝtkartoj (sen poŝtmarkoj): 10 eŭroj (t.e., rabato je 1/3)
- ★ 5 poŝtkartoj + poŝtmarkoj (poŝtmarkoj algluitaj sur la poŝtkartojn): 10 eŭroj (t.e., rabato je 1/3)

“LA VOJO” SUR GLUMARKOJ

Elda DOERFLER

Jam de kelkaj jaroj amiko de Elf-Arek, s-ro Giacomino MARTINEZ el Udine, Italio, laboradas super la katalogoj pri poŝtmarkoj, tutaĵoj, stampoj, glumarkoj k.a. Nuntempe li okupiĝadas pri la kompletigo de tiu glumarka, tasko kiu ŝajnas esti senfina, sed pli aŭ malpli frue, armitaj per granda pacienco, ni sukcesos tiun ĉi finfari. Kio tamen tre malhelpas la faradon estas, ke daŭre kaj daŭre aperas interrete ĉiam



novaj glumarkoj: novaj, sed envere malnovaj, eldonitaj antaŭ multege da jaroj, sed ĝis nun neniam antaŭe viditaj, nek priskribitaj en la ampleksaj katalogoj, ellaboritaj de nia kara Richard HIRSCH, kies precizemo kaj zorgemo estis laŭdindaj kaj imitindaj.

Kio plej pensigas nin dum la kataloga kompostado, estas la lavango da glm-oj, sur kiuj - bedaŭrinde tre ofte - estas indikitaj nek eldon-dato nek devenlando. Kiel do enlistigi ilin? Tial ni petas ĉies helpo per trafaj sugestoj, por solvi ĉi problemon: ni estos tre dankaj.

En la antaŭa paĝo aperas folio el 20 triangulformaj glumarkoj, kies verdaj bildoj diferencas unu de la aliaj. Devenlandon mi ne sukcesis diveni, nur eblas supozi ke ilia eldondato datiĝas de la 1920aj jaroj, post la unua mondmilito.

Rigardante per lupeo la diversajn bildojn, oni surpriziĝas pri precizeco kaj eleganco de la grafiklinioj, klare esprimantaj la sentojn vekitajn de la vortoj skribitaj sur du laterrandoj de ĉiu unuopa triangulo.

Ne facile deĉifreblas la skribitaĵoj, tial mi vin helpas malkaŝante ke ĉe la lateroj aperas kelkaj versoj de la Zamenhofa poemo LA VOJO. Kio plej mirigas, estas ke la grafikisto detale bildigis po du versojn sur ĉiu unuopa glm-o.

LA VOJO

- 1- Tra densa mallumo briletas la celo,
al kiu kuraĝe ni iras.
- 2- *Simile al stelo en nokta ĉielo,
al ni la direkton ĝi diras.*
- 3- Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
nek batoj de l' sortoj, nek moko de l' homoj,
- 4- *ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
ĝi estas, la vojo elektita.*
- 5- Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante,
ni iru la vojon celitan!
- 6- *Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
traboras la monton granitan.*
- 7- L' espero, l' obstino kaj la pacienco –
jen estas la signoj, per kies potenco
- 8- *ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
atingos la celon en gloro.*
- 9- Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
pri l' tempoj estontaj pensante.

10- Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, –
ni semas kaj semas konstante.

11- Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
velkantajn foliojn deŝiras,

12- ni dankas la venton, kaj, repurigitaĵ,
ni forton pli freŝan akiras.

[....]



Aŭskultebblas la tuta poemo LA VOJO, deklamita de
la franca esperantisto GABRIEL CHAVET (1880-1972) ĉe:
<https://gallica.bnf.fr/ark:/12148/bpt6k128110h?rk=21459;2>

Sur la sekvaj glm-oj, de n-roj 13 ĝis 20, estas skribitaj diversaj motoj,
aŭ sentencoj aŭ simplaj deklaroj pri Esperanto.

13- Ĉiam *je* kontraŭ atakoj
sovaĝaj ni restos kuraĝaj

14- Lingvo internacia
la mondo estu via

15- Vivu esperanto kaj
la batalantoj por ĝi

16- Post la venko de Esperanto
paco kaj vero reĝos sur tero

17- Sub la sankta signo de l' espero
kolektiĝas pacaj batalantoj

18- Laboro konstruas,
milito detruas

19- Paco, paco, kaj ĉiam paco

20- Milito al milito

Entute, tiu sinsekvo da glumarkoj vekis en mi ian emocion pro la elektitaj vortoj kaj la bildoj ilin klarigantaj. Primeditindas la devizoj sur la lastaj glm-oj: hodiaŭ neniuj *kuraĝus* tiele esprimi sin en rilato kun la lingvo internacia. En foraj tempoj tiu ekzaltiĝo, tiu fervoro aperantaj en la plej diversaj propagandiloj estis sufiĉe komunuzaj: tiuj klare kaj ĝuste spegulas la ideojn kaj idealojn de la batalantoj por Esperanto, kiu estis konsiderata la plej bona rimedo por interpopola komunikado, kapabla forfali ĉiajn interhomajn murojn.

STAMPO + GLUMARKO

Amiko el Serbio sendis al mi poŝtkarton, surhavantan portreton verd-koloran de *Dr. L. L. Zamenhof aŭtoro de la lingvo Esperanto*, eldonitan de la Esperanto-societo Niš (Serbio).



LA GLUMARKO:

Mezuroj - 4mm x 48 mm; fono blanka; ĉirkaŭ la centra bildo, plurkolora, skribita helverde estas: 1a Renkontiĝo de Serbiaj kaj Montenegraj Esperantistoj, 30-31 Majo - 1 Junio 2003.

Sub la dato la sama teksto en la serba lingvo, per cirila alfabeto. Dekstre la E-stelo. Meze, du heroldoj tenantaj la respektivajn naciajn flagojn.




LA STAMPO:

Mezuroj - 33mm x 34mm, ronda; inko - malhelblua. Eldonita okaze de la 55-jariĝo - 29.05.1956 28.05.2011 - de la Fervojoisto Esperanto Societo "MILE VELIČKOVIĆ", NIŠ. Mile Veličković estis prezidanto de la landa sekcio de IFEF, unu el la redaktoroj de la revuo *Jugoslavia Fervojoisto* kaj fakdelegito de UEA.



INFORMCELA GLUMARKO FRANCLINGVA POR LA UK-1932^a

Albert BOON




Priskribo: Ortangula (70 mm x 42 mm) glumarko, sur kremkolora papero.

Teksto per blua inko en ornama, blua listelo (65mm x 40 mm).

Averse: franclingva teksto.

Reverse: gumo

Jaro: 1931 (?)

Traduko:

Maison = domo

B^d = Bulvardo

15^e = 15a urba kvartalo

La oficiala glumarko de 1932:

1 2 1 3 1



4 1 5 1 6

La kongresa glumarko de la 24a UK estis kreita kaj desegnita de Ludovic RODO PISSARO. Ĝi estis publikigita sur folioj kun po dek ekzempleroj. Ili prezentas 6 variojn, distingeblajn laŭ nombro, loko kaj formo de la steloj. En vario 5 eĉ mankas la teksto sub la dekstra brako de la anĝelo. Ankaŭ ekzistas kelkaj raraj presprovoj sur kolora papero. Krome, ceteraj glumarkoj (folioj) estas helkoloraj, aliaj malhelkoloraj:




CLARENCE BICKNELL, ĈU ANKAŬ FILATELISTO?

Elda DOERFLER

Tiu ĉi tre konata esperantisto, naskita en Londono, 1842, estis anglikana pastro, kiu ekde 1879 vivis en Bordighera, Italio, apud kiu li mortis en 1918. Eklektika homo: literaturisto, naturisto, verkisto, vojaĝanto, botanikisto, desegnisto kaj pentristo, arkeologo kaj ... Poeto!

Antaŭ la eklerno de Esperanto, li studis Volapukon. Li ĉeestis la 1an UK-on en Boulogne-sur-Mer, dum kiu li estis elektita Lingva Komitatano. Clarence Bicknell preskaŭ tuj komencis traduki al kaj verki en Esperanto. Per poemoj plurfoje li partoprenis en la Floraj Ludoj, kun ofta sukcesa rezulto kaj kunlaboris kun pluraj esperantistaj revuoj (i.a. *La Revuo*, *L' Esperanto* kaj *La Brita Esperantisto*).

C. Bicknell krome multe kontribuis al la pliriĉigo de la unua E-kolekto de kristana himnaro "Ordo de Diservo". Multon alian oni povus pri li rakonti, sed ... al ni interesas prefere malkovri, ĉu li estis ankaŭ Filatelisto. Pro kio tiu ĉi demando? ĉar mi trovis de li vere ĉarman poezion kies protagonisto estas

**LA POŜTMARKO!**

Ĉu mi bonfaras?
Ĉu mi eraras?
Jen la problemo!
Ĉu filatelo estas la celo
inda je emo?
Ankaŭ l' elspezo
ŝajnas frenezo!
Sed la albumo
ne pliriĉiĝas,
nek perfektigias
sen grava sumo.


Geografion
kaj historion
eble mi lernas,
kiam per gumo
mi en l' albumo
poŝtmarkojn sternas.
Sed la laboro!
en ĉiu horo
mi nur skribadas,
poŝtmarkojn sendas,
ŝanĝas kaj vendas

aŭ aranĝadas.
Ne estas bela
l' art' filatela
ĉar ilustritaj
signoj de Poŝtoj
estas Reĝ-Moŝtoj
senkapigitaj!
Do mi ne scias
ĉu mi envas
reĝojn, ĉu male;
ĉiuj, sen manoj,
krur' aŭ kalkanoj
ŝajnas egale.
Tamen pro l' emo
mia ŝparemo
plimultobligas;
laŭ mia sperto
ĉiu koverta
altvalorigas!
Foje forĵetis
ilin, aŭ metis
mi en la flamon;
nun mi tre pentas;
mia kor' sentas
Poŝtmarkan amon.
Ho! la poŝtmarkoj!
Kiel pluvarkoj
lumas kaj brilas!
Ĉiu objekto
en la kolekto
floron similas.
Mi ĝin daŭrigos
kaj amasigos
dekcentmil frankojn;
kaj diros filoj:
«Pro viaj miloj,
Patro, mil dankojn.»

En la urbo, sen amikoj
de kamparo aŭ ĝardeno,
sen violoj kaj lilioj,
roz', konvalo aŭ jasmeno;
brilas antaŭ mi alia,
kvankam artfarita, beda,
ruĝa, blua, flava, verda,
kiel bela florbukedo;
kaj mi revas pri l'odoroj
de ĝardeno kaj kamparo,
per la bildoj kaj koloroj
de la gaja poŝtmarkaro.
Kaj en la kamparo, kien
ne alvenas la influo
de komerco, politiko,
aŭ senĉesa mondobruo;
pri la landoj malproksimaj
mi pripensas, — pri la reĝoj,
pri la vivo de l' popoloj, —
ĝiaj faroj, ĝiaj leĝoj;
kaj la pensoj min kunligas
per amsentoj al homaro,
ĉar pri ĝi min memorigas
la tutmonda poŝtmarkaro.
Ho poŝtmarkoj! dum en urbo
aŭ kamparo venas revoj
pri beleco aŭ sciado,
eble forgesiĝas devoj;
sed vi dolĉe min riproĉas,
vi, nur pecoj da papero,
sed flugiloj sindonemaj
por ĵurnalo aŭ letero.
Jes! tre noble vi kondukas,
mia bona amikaro:
do mi ŝatas kaj salutas
vin, ho mia poŝtmarkaro!

Clarence BICKNELL

TROVITAĴJ IE-TIE




Jen erara folio de la UK en Haarlem 1954. Kiel vi rimarkas, tri kvaronoj de la glumarkoj ne havas tekston. Ĉu konata eraraĵo aŭ nekonata raraĵo?

Informis Albert BOON



Ĉu iu rakontos ion pri ĉi tute nova Individua poŝtmarko (Ipm)? *ED*



Poŝtkarto kun portreto de Johan Martin Schleyer, la patro de Volapuko, sendita la 12^{an} de junio 1898 el Graz. La subskribinto nomiĝas Ludwig ZAMPONI, kiu estis la prezidanto de la Volapuka Klubo tiu-urba.

Kial paroli pri li? Ĉar, fosante en mia arkivo, mi trovis kuriozajn forgesitaĵojn, kiuj povus interesi ankaŭ vin.

Unue, ke en mia urbo aperis en 1887, zorge de la Triesta Komitato por propagando kaj studado de Volapük, la *Gramatiketo de Volapük* (*Universala Komerca Lingvo*). 14-paĝa.

Grammatichetta di Volapük (Lingua Commerciale Universale). Trieste: Serejani 1887. 14 S.
(LB Graz: I 97370.)

Due, anonco en la prova numero, dec. 1895, de *Lingvo Internacia* diras ke:

La pastro Johann Martin Schleyer, elpensinta Volapük'on, ricevis de Lia Papa Moŝto Leo XIII la titolon de Monsinjoro de l' Sankta Roma Preĝejo. Tiu ĉi titolo estas donita al li pro la bono, kiun li faris al la homaro, elpensinte Volapük'on.

Hazardaĵo: En la Gramatiko redaktita de Vincenzo AMORETTI, en 1888, por italoj, aperis sur ties lastaj paĝoj la Statuto de la Asocio por la Propagando de Volapük en Italio, tiam kun sidejo en Torino. Inter la estraranoj sin trovas la nomo de la itala pioniro de Esperanto el Udine, Achille TELLINI. Tio por mi estis novaĵo.



ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Prezidantino:

Elda Doerfler

Via Ghirlandaio 18/1 IT-34138 TRIESTE

testudo.ts@gmail.com

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX

Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK - Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti la prezidantinon.

Kunredaktantoj: James Rezende Piton - sudastelaro@gmail.com

kaj Albert Boon, Esperanto-Numismatika Asocio

bert.boon@skynet.be



La unua kovril-kapo de FENIKSO, informilo de Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj, aperinta la 1an de oktobro 1968.